XXVII ORDINARA TEMPO – 2an de oktobro 2011

Li luigos la vitejon al aliaj kultivistoj. – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Mt 21,33-43

En tiu tempo Jesuo diris al la ĉefpastroj kaj pliaĝuloj de la popolo: «Aŭskultu alian parabolon. Iu plantis vitojn en sia kampo, kaj ĉirkaŭŝirmis ĝin per heĝo; li fosis por loki vinpremilon kaj konstruis gardoturon; poste li luigis ĝin al kultivistoj kaj forveturis.

Kiam venis la tempo de la rikolto, li sendis siajn servistojn por ricevi de la kamparanoj ĝiajn fruktojn. Sed la kultivistoj kaptis liajn servistojn, batis unu, mortigis alian, ŝtonbatis la trian. La domomastro sendis denove aliajn servistojn, pli multajn ol la unuaj; sed la kamparanoj faris al ili sammaniere.

Fine li sendis sian filon, opiniante: "Ili respektos mian filon!". Sed la kultivistoj, vidante la filon, diris inter si: "Tiu estos la hereda posedanto. Ni do mortigu lin kaj ni havos lian heredaĵon". Ili kaptis lin, elĵetis lin ekster la vitejon kaj mortigis lin». Tiam Jesuo demandis: «Kiam venos la sinjoro de la vitejo, kion li faros al tiuj kamparanoj?». La ĉeestantoj respondis: «Tiujn malbonulojn li senkompate pereigos kaj luigos la vitejon al aliaj kultivistoj, kiuj donos al li la fruktojn ĝustatempe».

Jesuo diris al ili: «Ĉu vi neniam legis en la Skriboj: "La ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj, fariĝis bazangula ŝtono. La Sinjoro tion faris, kaj ĝi estas mirindaĵo antaŭ niaj okuloj"? Pro tio Mi certigas vin, ke estos de vi forprenata la regno de Dio, kaj ĝi estos donata al nacio, kiu liveros ĝiajn fruktojn».

Post kiam li vortatakis la ĉefpastrojn kaj la pliaĝulojn kaj post kiam li denuncis ke ili, kiuj opiniis esti la kategorioj plej proksimaj al la Sinjoro, estis ekskludataj de la Regno, kien male estis enirintaj la plej malpuraj, la plej malestimataj kategorioj, la impostistoj, kaj la publikulinoj, Jesuo ĵetis plian atakon kontraŭ la plej gravajn religiajn aŭtoritatulojn. Tion ni legas en la evangelio de Mateo, ĉapitro 21, versikloj 33-43.

Jesuo sin turnas ordonmaniere, sen ajna respekto kaj omaĝo, al tiuj ĉefoj kaj diras. "*Aŭskultu*", kiu ne estas invito, sed tre preciza ordono. "*Aŭskultu alian parabolon*", kaj ĝi estas la tria inter la paraboloj kies temo estas la amo de Dio por la vitejo. Kaj Jesuo citas faman pecon de profeto Jesaja, la amokanton de la Sinjoro por lia vitejo entenata en la ĉapitro 5, kiu, post rakontado pri la tenereco de la Sinjoro por lia vitejo, finiĝas per priplendado de la Sinjoro.

Li atendadis ke ĝi produktos vinberon kaj male ĝi produktis sovaĝan vinberon, li atendadis justecon kaj male "*Jen sangelverŝo*". Nu Jesuo rakontas ke "*Kiam venis la tempo de la rikolto, li sendis siajn servistojn por ricevi de la kamparanoj ĝiajn fruktojn*". Kaj kion faris la kamparanoj? "*Sed la kultivistoj kaptis liajn servistojn, batis unu, mortigis alian, ŝtonbatis la trian".*

Jesuo resumas tiun kiu estas la sorto kiu atendadas la profetojn. Ribelo al la religiaj aŭtoritatuloj tio estas grava denunco: la religiaj aŭtoritatuloj neniam rekonas la senditojn de Dio, eĉ male ili tiujn malhelpas kaj, kiam eblas, tiujn mortigas. "*La domomastro sendis denove aliajn servistojn, pli multajn ol la unuaj; sed la kamparanoj faris al ili sammaniere*". Fine tiu dommastro diras: "Mi sendas mian ununuran filon". Fakte li sendas sian filon: "*Fine li sendis sian filon, opiniante: Ili respektos mian filon!",* kaj ankaŭ la vorto "filo" aperas trifoje por indiki la kompletecon de tiu temaro.

La dommastro pensas ke ili respektos la filon, sed li ne scias ke tiuj kamparanoj, bildigo de la religiaj aŭtoritatuloj, pretendas respekton por si mem, sed ili respektas neniun. Fakte Jesuo denuncas: *«Sed la kultivistoj, vidante la filon, diris inter si: "Tiu estos la hereda posedanto. Ni do mortigu lin kaj ni havos lian heredaĵon"*». La denunco de Jesuo estas terura. Ĉio tio kion faras la religiaj aŭtoritatuloj ĝin ili faras nure pro propra avantaĝo, pro propra intereso.

La Dio de ili adorata ne estas la Patro de Jesuo, sed la Dio de la templo estas mamono, la profito, la intereso; do ili rezonas "tiu estas la heredanto, ni li mortigas kaj ni prenos la heredaĵon". Ĉio kion ili faras estas pro intereso. Pro intereso – kiel denuncas profeto Jesaja – ili pretas diri ke estas bono tio kio estas malbono, kaj malbono tio kio estas bono. Tio kiu gvidas la agadon de la religiaj aŭtoritatuloj neniam estas la bono de la popolo, sed ilia bono. Ne estas tio kio konvenas al la personoj, sed tio kio konvenas al ilia institucio.

Kaj fakte, denuncas Jesuo: "*Ili kaptis lin, elĵetis lin ekster la vitejon kaj mortigis lin"*. Ili estas la manieroj entenataj en la libro de Levidoj, en la ĉapitro 24, rezervitaj al blasfemantoj. Jesuo estos kondamnita kiel blasfemanto. La religiaj

aŭtoritatoj kiuj devis konigi al la popolo la volon de Dio. Kiam ili renkontas Dion kiu iĝis homo en Jesuo, ili lin denuncas kiel blasfemanton. Reale estas ili kiu blasfemas misformante la vizaĝon de Dio.

Nu Jesuo estas parolanta kun la ĉefpastroj kaj diras: "*Kiam venos la sinjoro de la vitejo, kion li faros al tiuj kamparanoj?*". *La ĉeestantoj respondis: "Tiujn malbonulojn li senkompate pereigos*", laŭvorte ilin detruos*, "kaj luigos la vitejon al aliaj kultivistoj".* Estas ili mem kiuj verdiktis propran verdikton.

Pro intereso ili mortigis kaj la intereso ilin detruas. Ili estas formanĝatai de mamono, la diaĵo kio detruas ĉion kaj estas la pastroj mem kiuj verdiktas pri si mem. Ĉifoje ili estis malprudentaj en la respondo. Kaj Jesuo kun profunda ironio – li estas alparolanta la ĉefpastrojn, la pliaĝulojn de la popolo…. diras al ili: "*Ĉu vi neniam legis en la Skriboj…".* Jes ili ĝin legis sed ne komprenas ĝin, la skribo povas esti komprenata nur kiam estas metata kiel interpreta kriterio la absoluta bono de la homo.

Kaj tio kio interesas al la aŭtoritatuloj estas la absoluta bono de ilia institucio, de ilia prestiĝo, de ilia povo, ili povas legi la skribojn, povas eĉ proklami ilin, sed neniam ili tiujn komprenos. Kaj Jesuo kun profunda ironio diras "ĉu vi neniam legis la Skribojn". Imagu temas pri psalmo, la 118, kompreneble ili ĝin legis! Sed ili ĝin legas sen kompreni ĉar la vualo de la povo malebligas al ili vidi la interpretan kriterion de la skribo: la amon de Dio por lia kreaĵo, la ununura vera absoluta bono.

Kaj Jesuo citas la psalmon 118 en kiu estas dirite: "*La ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj*", la inĝenieroj, la saĝuloj, "*fariĝis bazangula ŝtono*", la fundamenta, la plej grava. Kaj do jen la verdikto de Jesuo, post kiam ili mem eldonis sian verdikton, "*Pro tio Mi certigas vin, ke estos de vi forprenata la regno de Dio".* Ne nur la regno de Dio estas forprenata de ili, sed*, "ĝi estos donata al nacio*".

Tiuj paganoj kiujn ili taksis la ekskluditaj de la regno de la Sinjoro, tiuj paganoj kiuj devintus esti submetataj, la paganoj kiuj estis marĝenigitaj, male estos ili kiuj akceptos la regnon de Dio tiel ke "ĝi *liveros ĝiajn fruktojn"*. Poste estas la versiklo 44, kiu estas duba versiklo, sed kiu ĉiukaze estas mismetita. Ĝi devus lokiĝi post la 42.

Kaj la liturgia parto bedaŭrinde ne havas tre elokventan finaĵon. "*Aŭskultinte tiujn vortojn la ĉefpastroj kaj la fariseoj*" kaj aperas la fariseoj kiuj ne estis aperintaj, ĉar la evangeliisto volas komprenigi ke la kunpuŝiĝo de Jesuo estas kun ĉiuj religiaj fortoj en Izraelo, "*komprenis ke li parolis pri ili kaj klopodis lin kapti"*. Ili volas lin elimini.

La vortoj de Jesuo ne estigas deziron je pripento, sed la eliminon de tiu kiu ilin senmaskigis. Por la pastra kasto reganta, por la religiaj aŭtoritatuloj, estas neniu espero.